Ĉu alternativo?[1]

La kritika penso ĉe la fino de la 20a jarcento

Jurgo Alkasaro

La burĝa socio restas sen alternativo. Tiu ŝajnas la konkludo de la dudekjarcenta sperto: la radikala kritiko perdis sian kialon kune kun sia eblo mem. Memvideble tiu ĉi netaŭgo por la generado de alternativoj estas nedisigebla de la "fino de la historio" kaj la "morto de la subjekto". Mia celo en tiu ĉi artikolo estas pripensi tri aspektojn de tiu ĉi neniiĝo de la intelekto:

1. ĉu fariĝis sencela la serĉado de historiaj alternativoj, aŭ _ĉu ĝi ankoraŭ eblas, aŭ ne_ ĝi restas necesa?
2. kial la alternativo estas malpli ebla hodiaŭ, ol antaŭ 20 jaroj?
3. kio estas tio, kio reale malfacilas ĝin _se ne tute baras ĝin?

1. LA NECESO DE ALTERNATIVO

Rimarkinde la forlaso de la alternativideo ne devenas de konvinka laŭdo pri la socia sistemo, sed de la nepovo por ĝin aliigi. Ni konsideru do la kialojn, kiuj povus necesigi alternativon. Mi volas disigi ilin je du klasoj. Mi nomos *objektivaj* la kialojn, kiuj enhavas enajn kontraŭdirojn _imanentajn en la sistemo_, tio estas tiujn, kiuj ne apelacias valorjuĝojn. Mi nomos *subjektivaj* la kialojn, kiuj ne estas nure "logikaj" kritikoj al la meĥanismo, sed kiuj konsideras la konsekvencojn sur la homo, tio estas, tiujn, kiuj apelacias valorjuĝojn, sendepende ĉu la sistemo "funkcias" aŭ ne.

1.1 Objektivaj kialoj

a) la kapitalismo estas produktive neefika sistemo: ĝia ĉefa afero estas limigi sian produktivan taŭgon. Ĉar ĝi ne produktas por satigi bezonojn, sed por amasigi profiton, ĝi estas devigita ne produkti tiom, kiom ĝi eblus, malgraŭ ke la tri kvaronoj el la homaro bezonus kaj dezirus tiujn ĉi neproduktitajn varojn[2].

b) la kapitalismo ne taŭgas sorbi kaj produktive uzi la teknologiajn progresojn, kiujn ĝi generas, kaj de kiuj ĝi dependas. Kiel konsekvenco de la antaŭa punkto la teknologio, spronata de la kapitalisma konkurado mem, ne povas esti uzata **por pligrandigi la produktadon**, sed nure **por ŝpari laborfortojn[3]**, tio estas, pligrandigi la senlaboradon, malpligrandigante la aktivan popolon kaj samtempe la merkaton mem.

c) la kapitalismo estas memdetruanta sistemo. Ne nur ĝi ne taŭgas sorbi produktive la disponeblan laborforton, nek profiti la disponeblan kaj senĉese progresantan

1 Tiu ĉi artikolo estis publikigata ĉe *Laŭte* 1996(121)2-12

2 Mi preteratentas la demandon pri la planmanko, la tielnomata merkata anarĥio, tio estas ŝtelelspezo de krudaj materialoj kaj laboro en restaj produktoj kaŭze de la konkurenco.

3 Memkompreneble tiu ĉi rimarkoj koncernas la tuton de la sistemo, por ĉiu izolita firmao la afero povas esti inversa.

teknologion, sed krom tio ĝi bezonas la senĉesan detruadon de la kapitalisma socio mem: ĉiutage detruon de laborpostenoj kaj merkato, periode ĝeneraligitajn militojn kaj rekonstruprocesojn[4].

1.2 Subjektivaj kialoj

a) la produktado por la profito anstataŭ por la satigo de konkretaj bezonoj implicas, ke ĉiu teknologia progreso kunportas pligrandigon de la mizero anstataŭ mildigon de la labora penado. La teknologia progreso anstataŭ pligrandigi la eblojn de disvolvo de la homa estaĵo per la malpliigado de lia deviga labortempo kaj per la oferto de teknikaj kaj materiaj rimedoj por lia disvolviĝo, ĝi tute neniigas lin, ĉu forpelante lin el la socio, per aliigo en senlaborulon, ĉu robotigante lin, se li havas la bonŝancon/malfeliĉon teni la laborpostenon. Tamen la sola kialo, por ke la laborista kaj la studenta vivkielo ne estu identa, estas la produktado direktita al la akirado de profito anstataŭ ol al la satigado de bezonoj.

b) la sama kialo (sin bazi sur la abstrakta laboro[5]) kunportis la perforteprenadon de la naturaj riĉaĵoj de la nomata tria mondo, la detruadon de ĝiaj ekonomioj kaj la nunan netaŭgon mildigi tiajn rezultojn.

c) la vivkielo en la kapitalisma sistemo estas nekontentiga. Tion montras la engaĝmanko kun ĉiu ajn reala proceso kaj la forta forkuremo (konvene komerciita). La sistemo implicas senĉesan homdevaluton kaj, sekve, memmalestimon nur batalatan de la drogemo (ĥemia aŭ ideologia).

d) la sistemo ne taŭgas oferti iun ajn estontecesperon. Kvankam ĝi taŭgis neniigi kian ajn ŝanĝorevon, la sistemo estas tute nekapabla oferti ajnan esperon, eĉ sekurigi la panon por siaj sklavoj. Esprimoj el tiu ĉi fakto estas la ĝenerala malkuraĝo kaj la dissolvo de la kulturo en mensa teknikiĝado kaj pornografia penso.

Konkludo:

Se la antaŭdiritaj kritikaj asertoj ne estas malsaĝaj, ni havas grundojn por konsideri **necesa** socialternativon, kaj ni havas teknologian nivelon pli ol sufiĉe (la pligrandigo de la senlaboro kaj de la nevendita stoko estas pruvo) por ĝin realigi. Oni dirus, ke nur anstataŭigi la abstraktan laboron per produktado direktita al la satigo de konkretaj bezonoj sufiĉas, por ke komenciĝu la "homara historio". Malgraŭ ĉio tamen ne ŝajnas, ke la neceso kaj eblo sufiĉas por tio. Kio estas do tio, kio malpermesas nin fini la "prahistorion de la homaro", kies verto estas la burĝa socio? Antaŭ ol respondi tiun ĉi demandon, ni pripensu denove nian mensmedion.

2. LA DISFALO DE LA REALSOCIISMO

Ekde la fino de la antaŭa jarcento la estonto estis sociisma, la ĉefa kultura kaj socia motoro de nia civilizacio estis la sociisma kritiko kaj la espero en nova mondo. Tiu ĉi

4 Oni rimarku aliflanke la evidentan netaŭgon de la kapitalismo por konservi la medion, en kiu ĝi disvolviĝas kaj de kiu ĝi dependas.

5 Pri la koncepto de *abstrakta laboro* oni vidu la unuan ĉapitron de La kapitalo, t.e. MARX, Karl: *Das Kapital. Kritik der Politischen Ökonomie. Erstes Buch*. en *MEW* 23 pĝ 52 ss.

sociisma substrato esprimis sin per multenombraj gradoj de radikaleco, tamen ĉiam ĉeestis ĉie. Post la disfalo de la realsociisma reĝimo falas ankaŭ nia estonto kaj la ideo mem de la sociismo. Ĉu ni devas kredi, ke ĉiuj estis trompataj kaj kredis, ke la rusa realsociismo kaj la deziregata sociismo estis la sama afero? Memkomprene tio implicas, aŭ ke la sociismo revata por nia estonto estis tiu de Stalin (eble kun iom da vato), tio estas, ke oni ne estis sociisma sed kunkulpulo kun la stalina diktatorado, aŭ ke, se trompita, oni devas hodiaŭ elreviĝi el la soveta reĝimo, sed la disfalo de tiu ĉi tute ne nepras efiki sur la sociisman idealon. Oni ne vidas do, kial devas esti pli malutila al la alternativo la diktatora liberismo de Jeltsin ol la stalina diktatorado: ambaŭ estas tute fremdaj al la sociismo.

Mi faros etan skizon de la faktoj, kiuj sendependigas la sociismon el la realsociisma reĝimo, kaj, sekve, kiuj sendependigas iliajn respektivajn sortojn, antaŭ ol prezenti la ĉefan demandon: ĉu ni devas supozi, ke la plejmulto el la eŭropanoj estas senhelpaj malsprituloj, kaj ke ili ne rimarkis la malsamecon, ke tiel la estinta sociismemo de “nia” intelektularo, kiel ilia estanta merkatema apatio estas produktoj de malvirtega strategio de la kapitalaj ideologiistoj, aŭ eble restas malkovri ankoraŭ al ni iun gravan fakton pri la konduto de la socia konscio?

2.1 Sociismo kaj realsociismo

La ĉefaj trajtoj, kiuj, laŭ mia kompreno, determinas la sociisman projekton tiel, kiel ĝi estis ellaborata de Marx, estas

1. la kritiko al la abstrakta laboro,
2. la kritiko al la politika ŝtato,
3. la kritiko al la klasaj sistemo,
4. la kritiko al la historio, kiel legitimado de la estanto.

1. La abolicio de la salajrata laboro. La marksa kritiko al la abstrakta laboro bazas sian kritikon al la individua kaj kolektiva senigado, al la kontraŭdiroj de la kapitalismo ĉe la ekonomia kampo kaj al la sistemo de ekspluatado de la homa laboro. La fakto, ke la procezo de produktado ne estas direktata al la satigado de konkretaj bezonoj, sed al la akiro de profito, kunportas tiel la konkuradon por la kapitalamasigo, kiel la bezonon kruelege ekspluati la laborforton, ĉe la nivelo de la kapitanoj de la kapitalo; kunportas la perdon de la ligo inter la produktanto kaj la produkto, la variĝon de la laborulo, ĉe la nivelo de la sklavoj de la kapitalo; kaj kunportas la senigon de la homo (tiu, kiu diferencas de la aliaj estaĵoj per la produktado de siaj vivrimedoj) je la varo, kiun li produktas, ĉar tiu ĉi, aliigita kaj amasita je kapitalo, estas regata de objektivaj ekonomikaj leĝoj, per kiuj ĝi trudas sian fantoman kaj metafizikan volon sur la homo, kiu sekve prenas tiujn leĝojn kiel **naturajn leĝojn**, tiel la kapitalo iĝas fakte kvazaŭdio. Ĉe la nivelo de la socia praktiko kaj la politika luktado tiu ĉi kritiko konkretiĝas per la devizo: **abolicio de la salajrata laboro**.

   La realsociismo neniam ĉesis produkti varojn kaj ekspluati salajratan laboron. La fakto, ke ĝi faris tion neefike _kompare kun la resto de Eŭropo_, signifas, nek ke la ekspluadgrado mildiĝis, nek ke la ekonomika planado estis

determinata de io malsama ol la produktado de varoj kaj la kapitalamasigo. Fakte, ĉe ideologia nivelo, la duondiigo de la “salajrata laborulo”, de la “proleta klaso”, ktp. ne kongruas kun la abolicio de la salajrata laboro kaj la memdissolvo de la labora klaso, kiujn Marx celis.

2. Abolicio de la ŝtato. Laŭ Marx la ŝtato sencas nur ĉe socio disigita en klasoj. Ĝi estas la organo, kiu submetas la socion al la superreganta klaso. La individuo povos sin emancipi, nur kiam la socio sin emancipos el la ŝtato. Ni memoru la priskribon, kiun Marx faris pri la komunisma socio: libera asocio de liberaj produktantoj. Certe, Marx kredis _pro kialoj, kiujn ni pritraktos poste_, ke la unua paŝo por la konstruo de la nova socio estas, ke la revolucia proletaro prenu la politikan povon, ekkaptu la ŝtaton kaj trudu la tielnomatan proletaran diktatoradon, tamen, se oni studas la marksan kritikon al la Pariza Komuno kaj al la blankiismo, aperas klare, ke la proletara diktatorado _laŭ Marx_ estas la **detruo de la ŝtato**, la ŝtato ne taŭgas esti uzata de la nova povo, ĝi estas detruenda.

   Tiu ĉi pozicio estas kontraŭega al tiu de la realsociismo. Tiu ĉi forprenas la nomon de la popolaj povorganoj _kiuj konstituiĝis dum la revolucio, kaj kiujn ĝi disigas kaj anstataŭas_, sin fandas kun la malnova ŝtato “konvene reformita”, sin levas super la labora klaso kaj la tuta socio kaj efektivigas **sian** diktatoradon. Eĉ ĉe la teoria nivelo ĝi gloras la ŝtaton kiel subjekton de la historio.

3. Laŭ Marx unu el la plej gravaj problemoj, kiujn la homaro devas alfronti, estas ĝia disiĝo en sociaj klasoj. Homo ne taŭgas esti libera, tio estas, homa, tiel se li estas superregata, kiel se li superregas aliajn. La venko de la proletaro konsistas en ĝia memdissolvo kiel klaso kaj, sekve, en la dissolvo de ĉiu klaso kaj la aliiĝo de ĉiu individuo al homo. La komunismo do ne estas la superlevado de la proletaro kiel direktanta klaso, sed la fino de la sociaj klasoj kaj de la politiko.

   70 jarojn post kiam ĝi prenis la politikan povon, la realsociista ŝtato estis ankoraŭ **klasa ŝtato** kaj estis kantanta la senliman gloron de la sanktega labora klaso.

4. La fino de la historio. Marx kutimis moki ĉiujn finantojn de la historio. Laŭ la burĝoj (la ekonomikistoj diris li) estis historio, kaj tiu ĉi daŭris ĝuste ĝis la plenfirmiĝo de la burĝa sistemo, kun tiu ĉi kulminacias la historia proceso. Laŭ iuj komunistoj _li parolis pri “vulgaraj” kaj “mesiaj” komunistoj, tamen ni povas konsideri lin kiel profeton kaj kredi, ke li parolis pri la realsociistoj_ estas la komunismo, la socio sen klasoj, sen ekspluatatoj nek ekspluatantoj, la kulminacio de la historio, la komunismo estos jam la definitiva sistemo; kontraŭe laŭ Marx la komunismo estos nur unu historia fazo tiel efemera kiel ĉiuj aliaj, laŭ li la komunismo estos la **komenco** de la homa historio. Ĉe la komunismo estos inversigenda la proceso, kiu kondukis la ĝistiaman historion: ĝis tiam la historio estas la historio de la abstrakta homo, al kiu estas oferata la konkreta homo. Per la komunismo finiĝos tiun ĉi fazo de la homara prahistorio,

ĉar ĉe ĝi estos donitaj la bezonaj kondiĉoj, por ke la konkreta homo, la individuo, disvolvu siajn taŭgojn, kaj finfine komenciĝu la vera historio de la homaro, la historio de la konkreta homo. Kiel povos esti tiu ĉi historio, aŭ kien ĝi kondukos, tion ni tute ne povas scii.

Oni ne bezonas nombri la kontraŭegajn diferencojn de la realsociismo koncepto: submetado de la individuo sub la klaso kaj la ŝtato, de la socio sub la ŝtato, de ĉio sub la historio kaj de la historio sub la tielnomata komunismo.

5. Realsociismo kaj germana idealismo. Neniu el la ĉefaj trajtoj de la marksa kritiko estis plenumata en la realsociisma sistemo. Kio do, krom nuraj nomoj kaj festenaj paroladoj, kunigas la realsociisman reĝimon kaj la marksan sociismon? Por kompreni la ĝeneralan malviglon kaj la hipotezan neeblon de alternativo al la burĝa sistemo (alia historia fino), tute ne helpas al ni la malsukceso de la realsociismo. Kontraŭe la tezo de Kurz[6], kiu klarigas la realsociismon kiel la praktikan realigon de la germana idealismo, kaj la malsukceson de la unua kiel la definitivan superon de la dua, povas _laŭ mia kompreno_ helpi al ni pli bone kompreni el la teoria vidpunkto la malsukceson de la realsociismo kaj la nian mem.

2.2 La rusa revolucio.

La rusa revolucio de la 1917a estis la unua revolucio gvidata de sociistoj, kiu atingis la venkon. Tio provokis, ke ĉiuj sovetiaj konstruaĵoj postaj al tiu dato estis identigataj ĉu al la marksismo, ĉu al la komunismo kaj ĉiam al la sola ebla alternativo al la kapitalismo. Tial gravas konsideri du demandojn, kiujn mi klopodos pritrakti skize:

1. en Rusio neniam ekzistis sociismo, nek antaŭ nek post la stalina termidoro,
2. la realsociismo ne estas produkto de la revolucio, sed de ĝia malsukceso.

2.2.1 La sociismo en Rusio

La rusa revolucio okazis sub esceptaj cirkonstancoj kontraŭdirante la klasikan teorion pri la revolucio. Preskaŭ feŭda, submetita al cara aŭtokratio, lando troviĝis en ĥaosa situacio, kaŭze de la carisma ekonomia disfalo plimalbonigita de kontraŭpopola kaj nevenkebla milito. Tiel koincidis:

- la plena disfalo de la carismo kaj la malorganizo de la ŝtato,
- la malespero de la civitanaro malsatanta kaj dekonumita de la milito,
- la amasa dizerto de la frontarmeo,
- la manko de burĝaj partioj fortaj kaj enradikigitaj en la civitanaro,
- la forto de movado mistika-sociista de kamparana karaktero firme enradikigita en la rusa tradicio,

6 Oni vidu KURZ, Robert: *Der Kollaps der Modernisierung. Vom Zusammenbruch des Kazernensozialismus zur Krise der Weltökonomie*. Frankfurt: Eichborn 1991

- la apero de la sovetoj de laboristoj kaj soldatoj en la plej grandaj urboj, kiuj sin trovis kun la povo ĉe la manoj,
- la ekzisto de unusola opozicia partio lerte organizita kaj kun klaraj ideoj: la bolŝevistoj.

Nenio surprizenda, ke la partio surskribanta sur sia flago la gvidvortojn pri la militfino kaj la grunddisdono, tio estas paco kaj pano, atingis baldaŭ la plejmultecon.

Nun ne interesas al ni la sortoŝanĝoj de la rusa revolucio (nek la fama divido en "etapoj"), sed demandi kio povis esti farata, kio estis farata kaj ekde kiam oni scias, ke oni ne povis fari plu.

Jam la unuaj frataj kritikoj al la rusa revolucio montris la respondon: ĉe lando tiel neevoluinta kiel Rusio, la demando pri la sociismo povas esti enkondukita, sed ne solvita[7].

En Rusio ankoraŭ ne estis realigata la burĝa transformo, tio estas la servutulo ankoraŭ ne estis nek agis kiel libera homo (t.e. salajrata laboristo), la direktantaj klasoj ne komprenis la evoluon, kiu okazis en Eŭropo. Rusio bezonis la francan revolucion, ne la rusan. Tamen Rusio suferis jarcenton kaj kvaronon da malfruo, la nekortuŝebla kapitalista konkurenco ne permesis al ĝi "komenci per la komenco"[8], ĝi devis komenci per la nivelo jam atingita de la cetera Eŭropo. Tiel, al la feŭda disfalo sin prezentas nur du alternativoj (krom sin lasi sklavigi de la okcidentaj potencoj): starigi teroran reĝimon, kiu altrudis la industriigon kaj la industrian vivmanieron vipfrape, aŭ fari la sociisman revolucion.

Oni elektis la duan alternativon, kvankam kun la klara konscio pri la neeblo plenumi ĝin izole[9]: la rusa revolucio devus esti la fajrero, kiu ekbruligu Eŭropon. Sen la helpo de la eŭropa revolucia proletaro la konstruo de la sociismo en Rusio estis neebla[10]. Laŭmezure kiel la revolucio ne etendiĝis sur la industriigitan Eŭropon, la bolŝevistoj devis elekti aŭ fini la revolucian veton kaj starigi aŭtentikan kapitalismon, aŭ konservi la povon ĉiupreze atendante la eŭropan revolucion[11]. Ili elektis konservi la povon, tio implicis realigi la kapitalisman transformon de Rusio el ŝtato kontrolata de la bolŝevistoj, tio estis la Nova Ekonomia Politiko[12], la starigado de kapitalismo sen privata havrajto kaj kun planita merkato. Tio devus ebligi postan sociisman transformon "malpli doloran"[13].

---

7 Oni vidu LUXEMBURG, Rosa: *La revolución rusa. Un examen crítico*. Madrid: Castellote 1975

8 Oni rimarku, ke Rusio klopodas aliĝi al la kapitalismo, ĵus kiam komenciĝas la dekadenco de tiu ĉi, t.e. kiam la pasteĉo jam estas disdonita.

9 Oni vidu LENIN, Vladimir I.: *La revolución proletaria y el renegado Kautsky* en *Obras Completas XXX*. Buenos Aires: Cártago 1971 pĝ 144

10 Oni vidu TROTSKI, Leo: *La revolución permanente* en *Obras escogidas I*. Madrid: Fundamentos 1976, pĝ. 112, 116-117, 161

11 Oni vidu LENIN, Vladimir: «Intervenciones durante el debate del proyecto de resolución sobre problemas de la NEP» en *Obras Completas XXXV* pĝ 325; «La NEP y las tareas de las comisión de educación política» sama loko pĝ 504, 508; «La importancia del oro ahora y después de la victoria total del socialismo» sama loko pĝ 553 ss.

12 Oni vidu LENIN, Vladimir: «Tesis del informe sobre la táctica del PCR. Tercer Congreso de la IC» sama loko pĝ 358; «La NEP y las tareas...» sama loko pĝ 496-497, 501, 502.

13 Oni vidu LENIN, V.: «La importancia del oro...» sama loko pĝ 560.

2.2.2 La realsociismo

Per la definitiva malvenko de la eŭropa revolucio tiu paŝo malantaŭen (por doni du antaŭen) iĝis definitiva kaj la kapitalismo estis konstruata ekde tiam pro si mem. La suriro de Stalin al la povo esprimas tiun ĉi ĉefan turniĝon. Stalin realigis ne nur la plej kruelan kaj barbaran el la amasigoj de kapitalo, sed ankaŭ, por povi trudi sian teroran reĝimon, li bezonis neniigi la "malnovan bolŝevistan gvardion".

Ni reliefu do du aferojn: 1. la komenca sociista revolucio malvenkis, kiam ĝi ne taŭgis sin etendi sur la tutan Eŭropon, t.e. oni klopodis starigi la sociismon, sed oni ne starigis ĝin, ĉar tio **ne eblis**, 2. la realsociista reĝimo, kiun starigis Stalin sur la grundo de la antikva NEP kaj de la burokrata kaj "provizore" diktatora ŝtato, kiun tiu kunportis, esprimas la plenan malvenkon de la revolucia klopodo kaj estas nenio pli ol kapitalismo starigita sub kondiĉoj de nesufiĉo el kapitalo kaj de neeblo el ekspansio.

Konklude:

1. sociismo kaj realsociismo havas nenion komunan, sekve la disfalo de la dua koncernas neniel la unuan,
2. intencoj krom tio, kion objektive faris la bolŝevistoj, estis anstataŭi nepovan burĝaron en la realigo de la burĝa revolucio[14],
3. tiuj ĉi du faktoj estis konataj kaj publikigataj tiel de la ĉefrolantoj mem, kiel de iliaj kritikantoj kaj amikoj **ekde la 1917a mem**.

3. LA MALFACILAĴOJ POR LA ALTERNATIVELLABORO

3.1 Manko de materia bazo por la historia konsciiĝo

La transirperiodo de iu socio al la posta, laŭ la marksa klariga modelo, estas karakterizita de tio, ke ene de la malnova socio aperas novaj produktformoj kaj, tio estas plejgrave, novaj produktrilatoj. Tio estas, en la malnova produktsistemo aperas la ĝermo de nova produktsistemo. Tiuj ĉi novaj produktrilatoj disvolviĝas kaj montras sian pli altan efikecon, sian pli grandan rendimenton. La plej grava pruvo konsistas en tio, ke la ekonomia povo de la frakcio de la superreganta klaso, kiu elektis la novan produktsistemon, kreskas senhalte ĝis riskigi la ekonomian hegemonion de la aliaj frakcioj, tio kutimas finiĝi per politika alfronto kaj la paso de la politika povo al la nova superreganta klaso. Ekde tiu ĉi momento la fortikiĝado de la nova ekonomia sistemo estas senrevena.

Ĉe la dekadenco de la kapitalismo[15] aperas nova situacio en la historio: a) la klaso, kiu devas starigi la novan socion, ne estas frakcio el la superreganta klaso, sed la

14 Oni vidu TROTSKI, Leo: citita verko, pĝ 111-112. PANNEKOEK, Anton: «La revolución rusa» en *Lenin filosofo*. Madrid: Castellote 1975; «La revolución rusa» en *Los consejos obreros*. Buenos Aires: Proyección 1976. LENIN, V.: «Cinco años de revolución rusa y las perspectivas de la revolución mundial» en *Obras Completas XXXVI*.

15 Oni rimarku, ke Marx konis nur la suprenirantan fazon de la kapitalismo.

subpremata klaso, sekve b) la klaso, kiu devas edifi la novan socion, havas neniun posedon, kaj c) la preno de la politika povo devas esti antaŭa ol la akiro de la plej malgranda ekonomia povo.

Tiuj faktoj estas ŝablonoj por ĉiuj la marksismoj kaj restas klaraj ĉe la marksa verko mem. Ĝenerale ŝajnas, ke tio generas nur unu problemon: la sociisma revolucio komenciĝos kiel politika revolucio, kaj tiel la rolo de la konscio estos pli grava ol en la revolucioj ĝis nun konataj. Ankaŭ la solvoj ŝajnas simplaj: la personiĝo de la historia konscio en la klasa partio, kiu direktos la revolucion (lenina solvo nekongrua kun la marksa, laŭ kiu estas la klaso mem, kiu **konstituiĝas en partio**), kaj la koncepto de transiro el socio al alia kiel aŭtomata produkto de la ekonomia evoluo (socialdemokrata solvo validigita de la engelsa sinteno post la morto de Marx). Kiel sciate la du solvoj kunfluiĝis en la realsociismo.

Tamen, escepte de la lenin-blankiistaj kaj meĥanismaj pozicioj eksteraj al la marksa teorio kaj surpasantaj la problemon sen solvi ĝin, restas la ĉefa problemo: de kie devenas tiu ĉi "historia konscio"? Okaze de la sociaj transformoj en la ĝisnuna historio la revolucia konscio de la novaj superregantaj klasoj disponis **materian bazon**: la rektan sperton pri la nova kielo ekspluati la subprematajn klasojn. Sur tiu materia bazo povis kreski la kredo je socio surbazata sur produktsistemo parte, tamen klare, venkanta. La agontoj por la sociisma revolucio _sendepende, ĉu ili estus la proletoj aŭ ne_ povas disponi nur materian bazon por la **kritiko** kaj por **la konscio pri la bezono** je nova socia strukturo, tamen ili disponas neniun materian bazon por la **alternativellaboro** (pli klare: la supoza alternativo devas esti ellaborata anstataŭ esti spertita kiel ĉe la antaŭaj historiaj okazoj) nek _ĉefe_ por la **etendo de la revolucia konscio al vastaj tavoloj de la popolo**. Ŝajnas, ke la proksima alternativo devos esti **esence teoria**.

Ĉu tiu ĉi manko de materia bazo, tiu ĉi sensaco de malpleno sub la piedoj, estas tio, kio kondukis unuflanke konsideri la realsociismon kiel iun "preskaŭ", kiel "neperfektan modelon", malgraŭ la historia evidento, ke ĝi estas neniu alternativo, kaj ke ĝi estas sistemo tiel kapitalista kiel la okcidenta, kvankam pli malefika kaj sangosoifa, kaj aliflanke konkludi la vantecon de kiu ajn alternativo al la sistemo, kiam malaperis tiu ĉi **fikcia** materia bazo?

3.2 La intelektularo kaj la historia subjekto

La historia konscio ŝajnas esti perdinta ne nur sian materian bazon, sed ankaŭ sian "organon".

La neevitebla politika dimensio de la industriigkresko (faligo de la feŭda sistemo, aliigo de la vasalo al civitano) kunportis gravan kontraŭdiron inter la politika karaktero de la burĝa revolucio kaj la objektiva karaktero de la starigita sistemo: dum el la flanko ideologia-politika estas la homo, kiu devas preni ĉemane la historiiron kaj konstrui novan mondon laŭ sia mezuro kaj laŭ siaj idealoj, el la ekonomia flanko la homo kaj la tuta socio devas submetiĝi sub la merkataj leĝoj kvazaŭ naturaj leĝoj.

Ĉe la ideologia lukto kontraŭ la malnova reĝimo kaj la pasiveco de la vasalo aperas la *subjekto*, tio estas la abstrakta homo, la idealo, laŭ kiu devas esti mulditaj la konkretaj homoj por fariĝi **veraj homoj**, tio estas civitanoj. Tio estis la tasko de la intelektulo dum la revolucia epoko: la konstituado de la historia subjekto kaj sekve la starigo de la homa racio kiel gvidanto por la agado (ĉefe socia). Do la intelektularo naskiĝis kiel luktanto kontraŭ la teologia absolutismo kaj la feŭda despotismo, kiel vera flagportanto de la revolucia idealo: libero, egaleco kaj fratemo.

Laŭmezure kiel la revolucio venkis, tio estas laŭmezure kiel la politika povo de la burĝaro fariĝis garantianto por la disvolvo de la nova produktsistemo, ĝi aliiĝas de povo direktita "eksteren" (al la feŭdismo) al povo direktita "enen", tiel la politiko fariĝas apendico de la ekonomio.

Ĉar la nova socio portas la signon de la varo stampita sur la frunto kaj ne antaŭeniras eĉ unu solan paŝon pli ol tiom, kiom kreskas "ĝia" merkato, la vera historia subjekto, tiu, kiu reale determinas la historiiron, estas la kapitalo kaj ties memvaloriga proceso. Tiu ĉi neagnoskita historia subjekto, tiu ĉi *deus absconditus*, restos des pli ombrokaŝita, ju pli izolita, privata kaj konkurema estos la burĝa individuo, ju pli netaŭga estos ne nur por regi la sistemon, ankaŭ por eĉ kompreni ĝin.

Tial dum la tutmonda merkato estas ankoraŭ konstitufaze la individuaj interesoj de la burĝo kaj la ĝenerala intereso de la sistemo ne koincidas. Tiel la *ruzo de la racio*[16] sin manifestas je la transformado de la intelektularo el ideologia bataliono kontraŭ la tradicio al ideologia kompensilo de la burĝaj disiĝo kaj senkonscio. Tiel naskiĝis la figuro de la maldekstra intelektulo kaj tiu miraĝo, laŭ kiu ĉiu intelektulo estas maldekstra kaj ĉiu racio revolucia. La paralelo je la socia agado de tiu ideologia funkcio de la ("maldekstra") intelektularo estis la sindikatismo kaj la prolaborista politiko: ambaŭ ludis la rolon (kvankam serĉante aliajn celojn) plifaciligi la konstituon de la tutmonda merkato kompensante la burĝan "egoismon", t.e. trudante la ĝeneralan intereson de la burĝa sistemo al la privataj interesoj de la burĝoj. La rolo ludita de la socialdemokratio estas nura karikaturo de la tragedia rolo ludita de revoluciuloj kaj komunistoj kiel iloj de la *ruzo de la racio*.

Post la plena konstituo de la tutmonda merkato, politiko kaj ekonomio generas jam neniun kontraŭdiron pli ol la kaŭzitajn de teknika netaŭgo (aŭ de la "troa" korupto). Tiel okazas tri interesaj fenomenoj:

1. malapero de la diferenco inter *burĝo* kaj *civitano*[17], kaj aliiĝo de la politikulo al teknokrato,
2. malapero de la iluzio de burĝa subjekto, laŭmezure kiel la ekonomia strukturo absolutiĝas,

16 Pri la koncepto de *List der Vernunft* oni vidu HEGEL, G.F.W: *Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte*. Frankfurt: Suhrkamp 1986. Pĝ. 49.

17 Pri la koncepta distingo inter *bourgeois* kaj *citoyen* oni vidu MARX, Karl: «Zur Judenfrage» en *MEW 1* pĝ 355. HELLER, Agnes: *La teoría de las necesidades en Marx*. Barcelona: Peninsula 1978 pĝ 69.

3. malapero de la intelektularo[18] kiel socia aganto (neniu jam deziras “savi la mondon”) kaj/aŭ ties rekonverto en la kampo de la dungata politiko.

Ĉio ĉi kunportas, ke la konscio de la iluzia karaktero de la burĝa historia subjekto (postmoderna filozofio) fariĝas neigo de ĉiu historia subjekto. Tiel la dizerto de tiu “kolektivo”, en kiu enkorpiĝis la kolektiva konscio kaj la ideologia kritiko al la sistemo, fariĝas nova malfacilaĵo, kiun oni devas aldoni al tiuj, kiuj jam baras la kolektivan pripensadon pri la alternativo al la sistemo.

3.3 Socia penso kaj ekonomia formo

Ŝajnas, ke ne nur nia konscio, eĉ nia imagkapablo estas limigita de nia sperto, kaj sekve de la socia strukturo, en kiu ni vivas, tiel ke la superreganta ekonomia formo (la abstrakta laboro) ŝajnas formi ankaŭ nian “enan vivon”. Klopodi imagi socion liberan, feliĉan ktp ŝajnas konduki nepre al la reprodukto de la nuna socio kun la nura forigo de ĉio, kion ni pritaksas ne dezirinda. Kiam oni klopodas deflankigi la “difektojn” de la nuna socio, oni prijuĝas tiun difektojn kaj la socion mem per la valortabelo de la nuna socio, kaj tiu socio, kiun oni imagas, estas imagita kun la valortabelo de la nuna socio. Ni povas atingi alian valortabelon per intelekta streĉo nur “nee”, t.e. nur per deflankigo de tiuj, kiujn ni konsideras kaŭzo de difektoj, kaj la konservado de la ceteraj. Fakte kiu ajn klopodo serĉi novajn valortabelojn (kaj tio montriĝas ĉe kiu ajn utopio, eĉ ĉe la “neaj utopioj”) estas nenio pli ol modifo de la hierarĥio de valoroj en la valortabelo de la nuna socio.

La ellaborado de la teoria alternativo al la kapitalismo do ne povas sin bazi sur la fabrikado de utopioj, sur la idealista projekcio de miraklaj solvoj aŭ sur la futurismo, sed sur la kritika kaj racia traserĉado de nia propra historia kaj socia medio.

4. ĈEFAJ KLARIGENDAJ AFEROJ

Laŭ mia kompreno estas ankoraŭ misteraj al nia historia konscio iuj el la ĉefaj historiaj kaj filozofiaj aferoj de nia tempo, kaj mi kredas, ke sen ilia antaŭa klarigo ĉiu klopodo de serioza teoriigo restas kondamnita al la malsukceso[19].

4.1 Historiaj aferoj

- La rusa revolucio.Malgraŭ la impona kvanto da libroj publikigitaj pri la afero ankoraŭ ne estas realigita teoria analizo de tiu fenomeno, kiu _krom politikaj senperecoj kaj aliĝoj aŭ malakceptoj_ estas unu el la ĉefaj historiaj faktoj de nia tempo.
- La disfalo de la realsociismo. Tiu fakto, ne nur grava _ĝi provokas la “finon de la historio”_, sed eĉ proksima, ricevis malabundan teorian pritrakton. Tiu

18 Pri pli milda interpreto de la intelektulara rolo oni vidu PECHMANN, Alexander von: «Der Abschied des Linksintellektuellen», *Widerspruch* 22(1992)27-36.

19 Memkompreneble tiu ĉi distingo inter aferoj “historiaj” kaj ”filozofiaj” estas tute arbitra kaj baziĝas nur sur la kampoj, de kiuj ili devenas. Mi klopodas nur distingi ilin laŭ ilia abstraktnivelo kaj ilia supoza pezo en la koncepta framo, neniel laŭ la metodo de studo ktp.

ŝajnas fakto kondamnita esti bedaŭrata de iuj kaj festata de aliaj sed komprenata de neniu.

- La apero de la faŝismo (kontrapunkto al la rusa revolucio) ricevis grandan historiografian pritrakton, tamen, escepte de iuj psikologiaj studoj, restas en teoria mallumego eĉ pli nepenetrebla ol la rusa revolucio. Verŝajne temas pri du fenomenoj, kiuj ne sin lasas analizi disigitaj, rimarkinde tamen dum ŝajnas, ke "ĉiuj" komprenas la aliĝon de la popolo al iu celo kiel la rusa revolucio, la venko de la faŝismo aperas tiom pli mistera, kiom pli da kunkulpo kun ĝi oni duonvidas flanke de la demokratioj.
- La formala demokratio mem. Laŭdi ĝiajn meritojn kaj mallaŭdegi ĝiajn difektojn estas kutimaj aferoj. Tamen traserĉi ĝian historian funkcion, ĉu estas hazarda aŭ necesa ĝia rilato kun ekonomio superregata de la sennomaj firmaoj aŭ la rilato inter la homo- varo kaj la homo-baloto ktp, ankoraŭ ŝajnas sufiĉe blasfema, por ke oni ne ektraktu la demandon.
- La ekonomia krizo. Kvankam nia persona, politika, ekonomia vivo disvolviĝas ene de eterna krizo, kiu ĉiam estas finiĝanta sed ĉiam estas pli forta ol antaŭe, la mistero de socia sistemo, kiu ŝajnas sin nutri el sia propra krizo, apenaŭ ricevas teorian atenton.

4.2 Filozofiaj aferoj

- La subjekto. La problemoj, kiuj devenas de tiu ĉi demando, estis tiel malfermitaj ĉe ĝia mistera apero en la germana idealismo, kiel ĉe ĝia fulma malapero en la postmodernismo.
- La historio. La fino de la historio starigas antaŭ ni la demandon (memkompreneble krom ĉu reale ĝi finiĝis), ĉu ĝi estis iam, kaj kio estis jesokaze. Kontraŭe kiel eblis ĝiaj apero kaj gravo en la okcidenta penso?
- La racio. Ekde kiam la diino racio estis forigita el sia altaro de la *ila racio*[20] la tasko mem de la teoria traserĉo restas demanda. Kian validon havas la racia kritiko al la socia realo?

Oni rimarku, ke tiu ĉi serio da ĉefaj problemoj por studi estas nura listo de ŝablonoj. Tio estas ili estas aro da demandoj, kiujn oni supozas sunklaraj, kaj eble oni kredas, ke verŝajne havus neniun sencon pridubi ilin. Tamen la respondo al kiu ajn el ili estas la respondo al ĉiuj ili kaj al la historia demando pri la alternativo, kiu staras antaŭ ni.

Ŝajnas, ke la intelekta malkuraĝo de nia jarcento _laŭ kiu la problemo jam ne estas, ĉu ni povas aŭ ne trovi respondojn por la demandoj, sed ke kiu ajn respondo, kiun oni povas doni, ne estas pli taŭga aŭ pli bona ol kiu ajn alia, kaj tiel la teoria traserĉo estas nura tempoperdo_ povas rezulti finfine la ĉefa el la malfacilaĵoj, pri kiuj temas la 3. paragrafo. Klopodi kompreni ĝin, eble estas la una paŝo por ĝin venki.

20 Pri la koncepto de *ila racio* oni vidu HORKHEIMER, Max: *Zur Kritik der Instrumentellen Vernunft*. Frankfurt: Fischer 1967.